Temo: Efektiva Interkompreno por Daura Paco
5-a de Majo, 2017

4a Irana Esperanto-kongreso

En 5a de Majo matene je la 9a horo komencigxis la 4a Irana Esperant-kongreso meze de Tehrano en bela parko en printempa etoso kun verdaj arboj kaj brancxoj plenplena da folioj.

Laux la listo enskribigxis cxirkaux 43 personoj inkluzive unu el Sirio.

Cxe la komenco de la kongreso multaj personoj prezentis sian salut-mesagxon cxu proksimaj (de provincoj) cxu malproksimaj (el Tajvano) pere de Skype. Estis ankaux salut-mesagxo de honoraj personoj ekz. Renato Corsetti ktp.

Unua preleganto estis D-ro Sayadpour kiu parolis pri lia vojagxo al Ugando.

Sekvis la programo kun prelego de S-ro Fekri kiu allogis la partoprenantojn per amuzaj rakontoj kaj oni devis diveni la finan parton de la rakontoj.

D-ro Sufi prelegis pri lingvaj aspektoj de Esperanto: “kio estas pli bona lingvo?”.

D-rino Karimi pri “Virinoj en Irana Labor-merkato”. Gxi temis pri ekonomia situacio de la nunaj Iranaj virinoj.

Statistikoj en la prelego interesis la partoprenantojn.

S-rino ingxiniero Solat prelegis pri MK-10 Mez-orienta Kunveno)..

La posta Irana preleganto kiu logxas en Cxinio raportis siajn spertojn dum multaj jaroj en tiu lando.

Intresa parto de la kongreso estis auxkcio kiu por unua fojo okazis en nia kongreso por helpi kaj subteni Iranan Esperanto-Asocion (IREA).

Poste S-ro ingxiniero Mamduhi pri Naciaj lingvoj kaj Esperanto.

Fine d-ro Sufi prezentis raporton pri agadoj de junuloj en IREJO (Irana Esperanta Junulara Organizo) kiu inkluzivis traduko de filmoj kaj muzikoj, kaj la partoprenantoj auxdis tradician muzikon kaj vidis ties dancon.

Cxe la fino de la kongreso je la 17a horo oni havis komunan foton por ke ghi restu kiel alia memorinda evento de la Irana Esperanto-movado.

Rarpotis: **Surush Mohammad-zadeh**